

## Lernejoj en ĈSR

Gesinjoroj!

Parolante pri la nuntempa publika instruado en la ĉeĥoslovaka respubliko, mi devas mencii unu el la plej grandaj filoj de la ĉeĥoslovaka popolo (kaj ja samtempe) de la tuta homaro, Jan Amos Komenský, la instruisto kaj edukisto de la popoloj. Komenský, kiu vivis en la deksepa jarcento dum la tridekjara milito, latinigis sian nomon en Comenius kaj sub tiu ĉi ŝanĝita nomo li estas konata al ĉiu instruisto kaj edukisto de la tuta mondo. Sed ankaŭ ĉiuj propagandistoj de lingvo internacia konas tiun ĉi nomon. Li estis la unua scienculo-pacifisto, kiu klare esprimis sian konvinkon, ke lingvo internacia neniam povas fariĝi iu ajn lingvo vivanta, ke lingvo internacia, artefarita estas ne nur necesa, sed ankaŭ ebla. Konsiderante, ke dum lia tempo en kleraj rondoj la sole reganta lingvo estis la lingvo latina kaj konsiderante, ke ankoraŭ nun, kiam al lia ideo kaj arda deziro donis post pli ol tri-cent jaroj dr-o Zamenhof korpon kaj animon, ekzistas kleruloj, kiuj asertas, ke lingvo artefarita estas ne ebla, nia admiro antaŭ lia en la malproksiman estontecon vidanta spirito estas des pli profunda. Dum lia tempo la ĝenerala instruiteco de la ĉeĥoslovaka popolo estis rimarkinde alta. Vojaĝantoj-eksterlandanoj miris, kiel ni povas legi en iliaj vojaĝraportoj, pri la fakto, ke ankaŭ simplaj vilaĝanoj scipovas legi kaj skribi. Tiu ĉi bona, malnova tradicio profunde enradikiĝis en la animo de nia popolo kaj vivas ankoraŭ nun. Tion atestas la malalta procento da analfabetoj. En tiu ĉi rilato viciĝas la ĉeĥa branĉo de la ĉeĥoslovaka popolo antaŭ la germanoj en Germanujo kaj estas inter la unuaj popoloj de la tuta mondo. La teritorio de nia respubliko apartenanta ĝis la fino de la Mondmilito al la aŭstra-hungara imperio, estis dividita en du partoj: la aŭstra kaj la hungara. Al la aŭstra parto apartenis la landoj Bohemujo, Moravujo kaj Silezujo, al la hungara parto apartenis la Slovakujo kaj Subkarpata Rusujo, kiu libervole alliĝis post la ŝtata renverso al nia respubliko.

Post la disfalo de la aŭstra-hungara imperio staris la juna ĉeĥoslovaka respubliko antaŭ grava tasko kultura. Precipe en Slovakujo, kie nur dek-ses procentoj da infanoj havis la eblecon, viziti lernejojn kun slovakaj lingvoj instrua. La resto, okdek-kvar procentoj, de la granda plimulto, estis devigata viziti lernejojn hungarajn, kie ili ofte sidis nekompreneble eĉ vorton de la tute fremda lingvo. La sekvo de tiu ĉi sistemo estis aŭ hungarigo de la formebla infanta spirito aŭ analfabeteco, kiu montriĝis eĉ nekredinde alta cifero. Dum en Bohemio estas nur du procentoj da analfabetoj, en Moravujo du kaj duono, en Silezio tri, estas en Slovakujo, de sur teritorio iam hungara, dekkvin procentoj kaj en Subkarpata Rusujo eĉ kvindek. Ĉiu dua persono en tiu ĉi malgranda landeto povas nek skribi nek legi.

Malfortigita per la Mondmilito, kun zorgoj por la plej proksima estonteco la juna respubliko solvis ĉi tiun taskon kun honoro. Pli multe ol tri miloj da lernejoj estis konstruataj por duonmiliono da infanoj. Oni devis zorgi ne nur por la unuagradaj lernejoj, sed ankaŭ por lernejoj, el kiuj eliros la estontaj instruistoj, oni devis zorgi por gimnazioj kaj reallernejoj, fakaj lernejoj kaj laste sed ne lasta, por la nove fondita universitato en Bratislava, kiu donos al la slovakaj branĉoj de la ĉeĥoslovaka popolo kulturajn laborantojn kaj gvidantojn.

Unu el la plej kompetentaj konantoj de Slovakujo sub la iama hungara reĝimo, la aŭtoro de la historia verko "Sarajevo", la Anglo Seeton Watson skribis en artikolo pri la nuntempa Slovakujo: La plej malfacila kaj plej longdaŭra likvido estas likvido de kultura manko. La ĉeĥoslovaka respubliko plenumis per senbrua, senlaca kaj celkonscia laboro kultura» dekjarplanon senkomparan, kiu meritas la rekonon kaj estimon de la tuta civilizita Eŭropo.

La vizito de la lernejo estas en la tuta teritorio de la ĉeĥoslovaka respubliko deviga por ĉiu infano de la sesa ĝis la dekkvara jaro de sia aĝo. Ĉiu komunumo estas devigata konstrui lernejon, se en ĉirkaŭo de kvar kilometroj troviĝas kvardek infanoj devigaj al lerneja vizito. Se en komunumo troviĝas kvardek infanoj, devigaj al lerneja vizito, kiuj ne povas viziti lernejon en sia gepatra lingvo, ĉar en la komunumo ekzistas nur lernejoj kun instrua lingvo, kiu estas fremda al la infanoj, la ŝtato estas devigata konstrui al ili lernejon, tio estas lernejo por malplimultoj. Ĉi tiu leĝo validas same por la ĉeĥoslovakoj, kiel por la malplimultoj, la Germanoj kaj Hungaroj. La unuagradaj lernejoj havas du ŝtupojn: la popolan lernejon kaj la burĝan lernejon. Tiuj ĉi lernejoj estis antaŭe nur en la urboj kaj pro tio ili ricevis la nomon burĝa lernejo, nomo, kiu hodiaŭ jam ne tute esprimas la ĥarakteron

de la lernejo, ĉar ili troviĝas nun ankaŭ en vilaĝoj. Pli trafa estus la nomo civitana lernejo. La popolan lernejon vizitas la infano kvin jarojn, la burĝan tri. La burĝa lernejo havas tri klasojn, sed la plejmulto havas ankoraŭ kvaran, libervolan. Granda parto de niaj lernantoj vizitas do la lernejon naŭ jarojn. Dum la popollernejo donas al la infano la fundamentojn, la burĝa lernejo preparas la estontan civitanon por la praktika vivo aŭ por iu el niaj multnombraj fakaj lernejoj. Ili donas al la estontaj metiistoj, komercistoj kaj kampkulturistoj pli fakan instruadon ol povas doni la popollernejo. Nin esperantistojn interesas, ke en ambaŭ lernejojn estas enkondukebla esperanto kiel ne deviga fako. Al la legantoj de la Pedagogia Revuo certe estas konata la lernejestro s-ro Albin Neužil, kiu ĉiujare atingas en sia lernejo mirindajn rezultojn.

La rajtoj kaj kulturaj bezonoj de la malplimulto estas plene respektataj.

Unu el la ĉefaj principoj de Komenský-Comenius, ke ĉiu infano ricevu la fundamentan instruadon en sia gepatra lingvo, estas severe sekvata, kiel montras la sekvantaj statistikaj ciferoj.

En Bohemujo estas trimilnaŭ-cent ĉefaj lernejoj, tio estas sesdek-du procentoj. Ilin vizitas kvincent-okdek miloj da infanoj, tio estas sesdek-sep procentoj. La Germanoj havas dumil-tricent lernejojn, tio estas tridek-ok procentoj. Ilin vizitas tricent-kvar miloj da infanoj, tio estas tridek-tri procentoj. Komparante tiujn ĉi ciferojn, ni vidas, ke la ĉefoj havas en Bohemujo je 5% malpli multe da lernejoj ol respondus al la nombro de la lernantoj. Kontraŭe la Germanoj havas je 5% pli multe da lernejoj kompare kun la nombro da infanoj. Ankaŭ en Moravujo estas simila proporcio. La ĉefoj havas je 4% da lernejoj malpli multe ol respondus la nombron da lernantoj, kontraŭe la Germanoj havas je 4% pli multe da lernejoj ol estas la procento de la lernantoj. La Slovakoj, kiuj dum la hungara reĝimo havis preskaŭ neniajn lernejojn, havas nun du-mil-kvincent lernejojn, tio estas sepdek-tri procentoj, kun tricent-dekdu miloj da infanoj, t.e. sepdek-unu procento. Ili do havas je du procentoj pli multe da lernejoj ol rilatas al ilia procento da gelernantoj. La Hungaroj havas sepcent-dudek-sep lernejojn, t.e. dudek-du procentoj, kun cent-unu miloj da lernantoj. t.e. dudek-tri procentoj, do unu procento malpli multe.

Nia leĝo zorgas ne nur por infanoj normalaj sed ankaŭ por infanoj kun korpa aŭ anima aŭ morala defekto. Por surdmutuloj ni havas dek ses, por blinduloj 6 kaj por infanoj kun morala difekto 14 lernejojn. Specialajn lernejojn ni havas por ftizaj infanoj, kiuj loĝas en modelaj resanigejoj. Notindaj estas niaj lernejoj por kripluloj, kiuj estas konataj kiel bonegaj kantistoj. Je iliaj koncertoj, kiujn ili aranĝis eĉ en eksterlando, ili ĉiam kantas nian esperantan himnon, kiun ili ankaŭ kantis sur gramofonan diskon.

Kompare kun la nombro de la loĝantaro, dekkvar milionoj, la nombro de la mezaltaj lernejoj kaj fakaj estas rimarkinde alta. La Ĉeĥoslovakoj havas du-cent-sepdek-du mezaltajn lernejojn, la Germanoj naŭdek-naŭ, la Hungaroj dek, la Poloj du, la Rusoj ok, do entute nia respubliko havas tricent-naŭdek-unu mezaltajn lernejojn. La meza nombro da studentoj en klaso estas tridek. Pli multe ol cent miloj da studentoj vizitas ilin, tio estas 7% el la tuta loĝantaro de la respubliko.

La ĉefurbo de nia respubliko Praha povas fieri pri unu el la plej malnovaj universitatoj en Eŭropo. Ĝi estis fondita en la jaro mil-tricent-kvardek-ok kaj estis antaŭ kvindek jaroj dividita en du: ĉeĥa kaj germana. Krom tio ni havas en Brno ĉeĥan kaj en Bratislava slovakon universitaton.

La leganto de la ĉefverko de la ĉeĥa historiisto Palacký, trovas tie la sekvantan rimarkindan frazon: Ĉiam, kiam nia popolo venkis en la pasinteco, ĝi okazis pli multe per forto spirita ol per forto fizika. Certe ĝi estas bona atesto pri la matureco spirita de nia popolo kaj al tiu ĉi nobla tradicio ni restos fidelaj.

T. Kilian